Fine la promesitaj fotoj alvenis nur merkrede posttagmeze, kaj mi povis munti ilin haste ĵaŭde matene, kun

helpo de Maritza, ĵus antaŭ la kunsido pri ĝemelaj urboj...

### La komitataj kunsidoj

Estis multaj! Sabate posttagmeze, kiam okazis i.a. la elekto de nova estraro; lunde posttagmeze, kun voĉdono pri la estrara raporto de la jaro 2015; vendrede matene, kiu longiĝis je pli ol unu horo. Eĉ kun tiu plilongigo ne eblis trakti tian gravan temon kiel la buĝeto. Aldone merkrede matene, dum aliaj ekskursis, estis kunsido por debati pri la plej diskutata afero de tiu ĉi komitata sesio: ŝanĝoj en la statuto de UEA.

Al tio aldoniĝis kvin komitataj forumoj, kien ankaŭ ne-komitatanoj povas veni kaj debati.

Kiu volas scii pli pri la laboroj de la komitato trovos la registron de ĉiuj komitataj kunsidoj en la retejo de LKK <https://archive.tp.cvtisr.sk/archive.php?tag=esperanto>

(pli ol 12 horoj)

Kaj la protokolon en la teko de UEA [http://uea.org/l/teko/komitataj/ProtokoloprilakunvenodelaKomitato-deUEAenNitro\\_%281%29.pdf](http://uea.org/l/teko/komitataj/ProtokoloprilakunvenodelaKomitato-deUEAenNitro_%281%29.pdf)

(21 paĝoj).

C. Nourmont

# Filmoj de Roman Dobrzyński pri Esperanto-centroj

**I**nterkultura Centro en Herzberg-am-Harz – la Esperanto-urbo.

Roman Dobrzyński, nia konata kaj simpatia eksa profesia filmisto, raportis filme pri sia vizito al la Esperanto-urbo Herzberg-am-Harz, kie funkcias Interkultura Centro, pro kiu naskiĝis la famo de la urbo. Jesja, ĉi famon la urbo ŝuldas al la paro Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar kaj al la iama urbestro



Gerhard Walter, kiuj transformis la urbon al iu esperantujo, kie dulingvas la nomoj de plej diversaj lokoj.

La tutan jaron funkcias tie kursoj kaj seminarioj; troviĝas tie grava biblioteko kaj multas la okazoj de partopreno de la diverslanda esperantistaro en lokaj seminarioj kaj festoj.


Partnereco kun la pola urbo Góra funkcias danke al Esperanto.

Belas la ĉirkaŭa pejzaĝo kaj eblas simple turismi kaj loĝi en du hoteloj administrataj de samideanoj.

Grava sukceso de ĝisostaj esperantis-toj !

## Bona Espero en Brazilo.

Malgraŭ junaj fakuloj pri teknikaĵoj, kiuj kutime efike faciligis la laboron de la prelegantoj dum la tuta kongreso, ili ĉi-foje ne sukcesis helpi al Roman Dobrzyński por montri al ni sian duan filmon pri la brazila bieno Bona Espero kaj ties porinfana edukejo, kie pluraj centoj da infanoj ĝuis edukadon, ankaŭ en Esperanto, danke al la tutviva sindonemo de Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia. Feliĉe ambaŭ ĉeestis la aranĝon



kaj raportis mem pri la nuna funkciado de la bieno: ĝi ne plu edukas infanojn, sed akceptas nun kunlabore kun universitato de Brazilio seminariojn por inĝenieroj kaj teknikistoj pri ekologia agrikulturo. La bienuloj nun plantas kaj vendas legomojn kaj fruktojn al entreprenoj veganaj kaj vegetaranaj, ofte estrataj de esperantistoj. La antaŭ jaroj plantitaj arboj nun plene produktas. Ili profitis la ĉeeston de nia franca samideano Michel Basso por lin danki: li donacis al la bieno 500 arbojn. Rekompenco por Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia estas ankaŭ la vizito de eksaj infanoj de Bona Espero, kiuj nun plej bele sukcesis sian profesion vivon.

Edmond Ludwig

## Respondecoj de la UEA-estraranoj

En la UK en Nitra la komitato de UEA elektis novan estraron. Porinforme jen la laborkampoj de la estraranoj :

- Prezidanto Mark Fettes (Kanado): Strategio, Kunordigo, Statuta Reformo, Esploro kaj Dokumentado, Faka kaj Scienca Agado;
- Vicprezidanto Stefan MacGill (Hungario): Instruado, Jaro de la Lernanto, Meza Oriento kaj Norda Afriko, Rilatoj kun Membro-Organizoj kaj Ĝemelaj Urboj;
- Ĝenerala Sekretario Martin Schäffer (Meksikio/Germanio): Financoj, Administrado, Retejoj kaj Retlistoj, Ameriko;
- Emilio Cid (Brazilo): Informado, Amikoj de Esperanto kaj Zamenhof-Jaro;
- Lee Jungkee (Koreio): Azio, Afriko kaj Esperanto-Centroj;
- Sara Spanò (Italio): Eksteraj Rilatoj, Aktivula Maturigo, Eŭropo, Terminologio, Kulturo kaj Kongresoj.

(LAŬ GAZETARA KOMUNIKO DE UEA N-RO 631)



# Parolado de Vytenis Andriukaitis, eŭropa komisionano

## Konferenco en Nitra (ekstrakto)

**M**i estas ravita esti ĉi tie en Nitra por tiu grava konferenco, kiu traktas lingvan komunikadon en EU, kaj mi dankas la organizantojn pro la granda laboro dum la pasinta jaro.

La tri temoj de la konferenco estas aparte aktualaj en la hodiaŭa Eŭropo. Ili estas civitana engaĝiĝo kaj multlingvismo; ekonomia integriĝo kaj multlingveco; kaj eduka inkludo per plibonigita lingvolernado. Eŭropa integriĝo estis foje kritikata kiel laŭdire tro malproksima de la civitanoj; ke ĝi okupiĝas pri la ekonomio anstataŭ pri la civitanoj; ke ĝi malsukcesis alparoli la civitanojn en la profunda, emocia nivelo. La kresko de eŭroskeptikaj politikaj movadoj en la lastaj jaroj povas grandparte esti sekvo de fortaj naciaj identecoj fronte al la eŭropa identeco, kiu estas malforta aŭ neekzistanta.

Civitanoj konsideras la multlingvisman politikon de EU malforta, ĉar en la praktika vivo ili estas ofte devigataj uzi en siaj kontaktoj kun EU-institucioj nur unu aŭ du regantajn lingvojn. Tio kondukas al kreskanta fremdiĝo de EU ĉe civitanoj kies lingvoj ne estas vaste uzataj de la EU-institucioj. Tia malegaleco devus ne ekzisti. Multlingveco estas kerna EU-valoro, ĉar ĝi estas reprezentata mem en la koro de la devizo de Eŭropa Unio: Unuiĝintaj en diverseco. La kvar liberecoj, kiuj staris en la centro de la eŭropa projekto ekde la komenco – la libera moviĝo de varoj, personoj, servoj kaj kapitaloj – ĉiuj implicas interŝanĝon inter parolantoj de malsamaj lingvoj, ĉu rektan ĉu helpe de profesiaj tradukistoj kaj interpretistoj. Faktas, ke ni ĉiuj malsamas, sed ni ĉiuj estas egalaj. Ĉiu lando havas sian propran kulturen identecon, malsamajn kulturajn minoritatojn kaj ofte ne nur unu oficialan lingvon, sed ankaŭ plurajn malsamajn fremdlingvojn ene

de sia tereno. Kaj tiu bunteco igas nin malsamaj, sed ankaŭ egalaj, almenaŭ se temas pri niaj rajtoj kaj ŝancoj.

Multlingvismo estas esenca por certigi ne-diskriminacion en la traktado de EU-civitanoj, kaj por certigi ke ĉiuj lingvoj parolataj ene de EU, grandaj kaj malgrandaj; naciaj, regionaj kaj minoritataj lingvoj; estu respektataj kaj protektataj egale.

Ĉiu lingvo estas centra elemento de la identeco de sia parolanto. Proksimume 18 % de la tuta EU-loĝantaro havas la germanan kiel sian gepatran lingvon; malpli ol 1 % parolas la litovan, mian gepatran lingvon. Sed tio ne gravas por mi. La litova estas la lingvo kaj la pensmaniero, en kiuj mi kreskis; ĝi estas la unua paro de lensoj tra kiuj mi lernis rigardi la mondon.

Mi memorigu al vi, ke Eŭropa Unio estas bela pacprojekto. En 2012 EU ricevis la Nobel-premion por paco pro antaŭenigado de paco, repaciĝo, demokratio kaj homaj rajtoj en Eŭropo.

La multlingveco en EU povus kaj devus esti ekzemplo por strebado pri vivo en paco kaj diverseco. Ekzistas pluraj landoj, kiuj havas du aŭ tri oficialajn lingvojn, kiel Belgio, Finnlando aŭ Irlando, kompreneble. Kelkfoje ĉiu de tiuj lingvoj ludas malsaman rolon, sed mem la ekzisto de tia multlingveco estas evidenta esprimo de demokratio. Sekve, en la Eŭropa Parlamento kaj en la Eŭropa Konsilio ĉiuj 24 EU-lingvoj estas plene uzataj. En la Eŭropa Komisiono ni havas tri procedurajn lingvojn, sed multaj dokumentoj estas tradukataj ankaŭ en ĉiujn ceterajn EU-lingvojn.

Por konservi la lingvan diversecon en EU, ni en la eŭropaj institucioj multe



uzas tradukadon. Kompreneble ne eblas traduki ĉiun dokumenton kaj ĉiun novaĵon, kiun publikigas la Eŭropa Komisiono, al 24 lingvoj. Tamen, la plimulto de la informoj, kiuj interesas la ĝeneralan publikon, kiel la portalo de Publika Sano kiun administras miaj propraj servoj, estas disponebla en ĉiuj aŭ plejparto de la oficialaj lingvoj. Sed eĉ kun la ĉiam kreskantaj ŝancoj provizi facile kompreneblan informon al ĉiuj, ni daŭre memoru, ke la regado de aliaj lingvoj donas en konkurenca medio konsiderindan avantaĝon. Estas do grave, ke pluraj lingvoj estu instruataj en lernejoj. Lernantoj ankaŭ bezonas akiri prilingvajn kompetentojn kaj malferman sintenon al lingvoj, kiuj ebligas al ili daŭre disvolvadi siajn lingvokononajn dumvive.

Eŭropa Unio do finance subtenas lingvo-instruadon, kaj ĝi ankaŭ agnoskas la gravecon de lingva diverseco, subtenante la instruadon kaj de grandaj kaj de malgrandaj lingvoj. Ni helpas la Membroŝtatojn per aktivecoj de kun-

## pri sano, dum la malfermo de la Lingvopolitika

lernado, kiuj faciligas la interŝanĝon de bonaj praktikoj, por ke povu ekesti raportoj kiel tiu, kiun vi vidas ĉi tie, kaj financadon tra Erasmus+ kaj pluraj aliaj iloj.

La kunlaborado inter membroŝtatoj en la kampoj de lingva instruado kaj lernado estas ege bonvenigataj fare de la Eŭropa Komisiono. La kapablo komuniki en pluraj lingvoj estas parto de la Ŝlosila Competence Framework for Lifelong Learning, kiun la Komisiono revizios kaj plifortigos kiel parton de la Agendo de Kapabloj kiu estis adoptita antaŭ nur iom pli ol unu monato.

Ĉiuj tiuj menciitaj mezuroj estas esencaj ĉar ili povas ne nur trakti la bezonojn de eŭropanoj kiuj venas de ŝanĝiganta socio, sed ili ankaŭ kontribuas al pli forta kaj pli proksima integriĝo. Ekzemple, la projekto MIME = Multlingvismo, Inkludo kaj Moviĝemo en Eŭropo = kiun kunordigas la Universitato de Ĝenevo kaj Profesoro François Grin, disponigas scienca subtenon kun la celo montri, ke inkludo kaj moviĝemo estas plene kongruaj kun la hodiaŭa multlingva Eŭropo. Ni devas, do, daŭre antaŭenigi la plej bonajn praktikojn de lingvoeduko ĉie en EU.

Ni devas konsideri ankaŭ ĉiujn ilojn disponeblajn por atingi tiujn celojn. Do bonvolu permesi al mi daŭrigi mian paroladon per mia persona opinio pri alia afero, kiu estas tro ofte forgesata, sed povus esti same same grava - Esperanto.

Por mi persone Esperanto havas klaran ligan kun la lukto kontraŭ devigo. En la sovetia tempo la uzo de Esperanto estis protesto kontraŭ la reganta rusa lingvo, kiun oni devigis al ni uzi. En la disidenta movado mi proponis paroli Esperanton anstataŭe - kiel simbolo de humanismo kaj demokratio.

Do, kiel juna viro mi lernis tiun lingvon, ĉar mi estis inspirita de ties interna ideo, la idealo de mondo en paco. La instiga

idealo de Doktoro Ludoviko Zamenhof, kiu iniciatis Esperanton, estas ofte miskomprenata: Paco, bazita sur egalaj rajtoj kaj justeco. Esperanto estas nur ilo, kvankam tre grava ilo, por helpi atingi tiun idealon. Tiu idealo interkroĉiĝas nete kun la celo de Eŭropa Unio, kiun oni foje priskribas kiel la plej sukcesan pacprojekton iam ajn. Ĝi alportis al la 28 EU-landoj la plej longan periodon de paco en la historio.

Kiel Umberto Eco iam skribis, la vivo de Zamenhof povas esti inspiro al ni. Li parolis multajn lingvojn flue, kaj estis tiel bona ekzemplo de multlingvismo en praktiko, multlingvismo al kiu EU aspiras. Tamen lia tuta vivo estis regata de pasio defendi la egalan homan dignon de ĉiu homo, evitante ke fortuloj trudu siajn lingvojn al aliuloj. Li komprenis, ke tiu reciproka agnosko de egalaj homaj rajtoj de ĉiuj civitanoj endas por daŭra paco. (...)

Ene de EU, rolo por Esperanto povus helpi plifortigi komunan eŭropan identecon, kaj tiel igi EU pli efika en ties rolo de laboranto por paco en Eŭropo kaj en la tuta mondo. EU kaj Esperanto komune havas engaĝiĝon al paco, al

justeco kaj al ne-diskriminacio. EU tute ne konscias la vastan potencialon de Esperanto por pliproksimigi civitanojn al la eŭropa integriĝo, kaj unu al la alia. Plibonigita lingva komunikado povus multe lerni de la ĝenerala progreso de la eŭropa integriĝo, bazita sur la ideoj de Robert Schuman kiel unue esprimitaj la 9-an de majo 1950: «Eŭropo ne fariĝos subite, aŭ laŭ unu sola plano. Ĝi estos konstruita tra konkretaj atingoj, kiuj unue kreas faktan solidarecon.»

Simile Esperanto ne progresos subite, sed tra la libervolaj decidoj de kelkaj membroŝtatoj por doni al ĝi lokon en siaj instruplanoj, komence kiel helpilo por lingvolernado ĝenerale. La 4 Viŝegradaj landoj havas idealan pozicion por fari tiun unuan paŝon, en la kadro de sia jam bone evoluinta kunlaboro en aliaj kampoj. Mi esperas ke la Nitra konferenco, konstruante sur la Bratislava konferenco de 2006, ludos gravan rolon en la fortigado de multlingvismo kaj en la certigo de praktika uzo de ĉiuj niaj lingvoj. Ni neniam forgesu, kio estas la komuna celo de Esperanto kaj Eŭropa Unio - PACO.

### La Zamenhof-centro en Bialistoko

La aranĝo komenciĝis per tre mallonga prezento en Esperanto de la bialistoka Zamenhofcentro. Poste ekparolis en mitrale rapidpafa pola lingvo triopo da junaj elegantegaj belulinoj. Tradukis al Esperanto juna interpretisto. Certe, temis pri deĵorantinoj trejnita laŭ la plej modernaj teknikoj de komunikado, sed iom post iom sentiĝis la frustrigo ĉe la aŭskultantoj, kiuj diris al si: ĉu centro, kiu ŝuldas sian famon

al Doktoro Zamenhof ne postulas de siaj dungitoj la scion de la Internacia Lingvo? Des pli, ke la plejmulto de la dokumentoj, kiuj konsulteblas en la centro ja estas verkitaj en la Internacia Lingvo! Domaĝas! Eraro! Sed eraro korektebla. Ĉu?

EDMOND LUDWIG



## Sukcesa evento

### Kongresi en Marseille

**E**spéranto-France elektis la belan urbon Marseille kiel sian kongreslokon por la jaro 2016. La kongreso okazis de la 5a ĝis la 8a de majo 2016, kun la temo «Marsejlo Pordo de Eŭromediteraneo». Pli ol cento da homoj el proksimaj kaj foraj partoj de Francio, kaj ankaŭ el eksterlando (5 landoj) partoprenis.

Tre resume: bunta kultura programo, atento al la lokaj specialaĵoj, multaj vizitoj en la urbo kaj proksimeco, la kutimaj statutaj kunvenoj kaj laborgrupoj, ekzamenoj de la Franca Esperanto-Instituto, kaj interesa prelegaro.

La ĉefa kongresejo estis en pedagogia centro tuj apud la stacidomo Saint-Charles, vidalvide de la fama ŝtuparego. Eblis loĝi tre proksime de la kongresejo.

Tamen ne ĉio okazis en la ĉefa kongresejo, por ke la kongreso estu videbla en diversaj lokoj de la urbo.

### Simpatia akcepto

Bona ideo, ke la kongresa ŝildo montris la antaŭnomon en pli dikaj literoj ol la familia nomo ! Nu, en la nuna tempo oni pli emas alparoli la homojn per sia antaŭnomo ol per formala « sinjoro » aŭ « sinjorino ».

Malpli alloga estis la konstanta ĉeesto de almozetantoj ĉe la enirejo de la kongresejo, ŝajne establiĝintaj en tiu ĉi loko.

### Prelegoj kaj prelegetoj

Bona ideo, ke estis ne nur prelegoj, sed ankaŭ prelegetoj, kio donis la okazon al multaj homoj prezenti ion novan.

Ĉu vi jam aŭdis pri Nestor Maĥno ? Eble ne. Ĉu vi jam aŭdis pri Jean-Marc Leclercq (JoMo). Eble jes. La ligo ? Jean-Marc Leclercq ne estas nur la konata kantisto, sed havas multajn aliajn talentojn kaj interesojn. Ankaŭ li

estas preleganto, aŭtoro de libroj...

Nestor Ivanoviĉ Maĥno estis ukraina anarkiista revoluciulo kiu malakceptis

unuiĝi kun la bolŝevikoj post la Oktobra Revolucio. En siaj 16 jaroj li partoprenis la revolucion de 1905 kaj post kontaktiĝi kun diversaj politikaj grupoj li organiziĝis en la liberecana movado per realigo de danĝeraj komisionoj. Li estis liberigita en 1917, kun ĉiuj politikaj malliberuloj, pro la proleta insurekcio en Moskvo. Trafa temo por prelegi en la Anarkiista Centro de Marseille (CIRA), kun kiu la Esperanto-Grupo havas regulajn rilatojn.

Monique Arnaud prelegis «Por bona lernado de lingvoj» en la franca lingvo, laŭ la libro «nul en langues, plus jamais» (Nululo pri lingvoj ? Neniam plu !). Vidu LME 595.

Pri la helena geografo kaj esploristo Piteaso aŭ Pytheas de Marsejlo (naskiĝis ĉ. 380 a.K. ; mortis ĉ. 310 a.K.), el la greka kolonio Massilia, la nuntempa Marsejlo, prelegis Patrick Lagrange. Piteaso kalkulis je precizeco de dek kvar minutoj la latitudon de Marsejlo. Li komprenis la influon de la luno super la tajdoj. Liaj esploroj kondukis lin ĝis la nordaj bordoj de Eŭropo: la heraklajn kolonojn (Ĝibraltara Markolo), la marbordoj de Gaŭlio, Britio, la

Ŝetlandaj Insuloj kaj Tuleo. Je la pli norda punkto de lia navigado, la nokto ne daŭris pli ol du horojn.



Pierre Tell Bouvier prelegis pri « La perdita ŝlosilo ». Hodiaŭ ĉiu, kiu volas klarigi la Esperantan vortfaradon, parolas pri derivado. Tamen nek en la Unua Libro, nek en la Dua, eĉ nek en la Fundamenta Krestomatio, oni trovas tiun vorton. Kiam kaj kial ĝi aperis en Esperantujo dum la krizo de la Idoreformado ? Nepre necesas bone distingi tiujn du konceptojn : facileco kaj simpleco. Nia lingvo pli kaj pli iĝis ne simpla kaj konsekvence ne facila.

Preleg-debaton pri “Rusio hodiaŭ” gvidis Renée Triolle. Rusio estas lando proksima de ni sed ekzotika kaj ĝi daŭre fascinas. Dum la lasta jarcento, ĝi travivis diversajn politikajn ŝanĝojn, dum restadas la samaj trajtoj : centrismo, imperiismo ... kaj elturniĝemo kaj neinicativo. Plej ofte la raportantoj vizitis la landon dum kelkaj tagoj dum la preleganto, emerita instruistino de la rusa, «frekventas» ĝiajn historion kaj kulturon de kvindek jaroj. Ŝi raportis pri siaj impresoj pri la nuntempaj problemoj: korupto, manko da naskiĝoj, foresto de industrio, grandega diferenco inter milionuloj kaj malriĉuloj. Kun anekdotoj kaj travivaĵoj.





Rosy Inaudi prelegis pri "Ruĝaj ŝlimoj, poluado de Mediteraneo". En suda Francio, apud Marsejlo, uzino de baŭksito elverŝas la restaĵojn (ruĝajn ŝlimojn) en Mediteraneon, nun en naturan rezervejon. Alteo promesis redukti iompostiome la kvanton de ruĝaj ŝlimoj, kaj haltigi la ĵetadon de restaĵoj la 31an de decembro 2015. Sed, poste ricevis permeson daŭrigi tiun ĵetadon dum ankoraŭ 6 jaroj...

Aldone estis kelkaj prelegetoj. Thierry Spanjaard rakontis pri ITAP : Interkonsento pri Transatlantika Partnereco, danĝero por nia estonteco, kaj ankaŭ pri Metromapoj. Renée Triolle prelegis pri Victor Lebrun, iama sekretario de Tolstoï, esperantisto, filozofo, avangarda ekologiisto, abelbredisto, kiu dum la tuta vivo vivigis la principojn de Tolstoï en provenca vilaĝo.



Anne Jausions prelegis pri la francigo de «Kumeŭaŭa, filo de la ĝangalo» verkita de la jugoslava antropologo Tibor Sekelj. Michel Ahado proponis

surprizprelegon: Petoloj.

## La spektakla programo reprenis plurajn erojn kiuj aperis en la UK en Lillo, ne mirinde

Koncerto de JoMo: La mondrekordulo pri kantado en plej multe da lingvoj prezentis buntajn kantojn inspiritajn de diversaj kulturoj, ĉu en Esperanto, ĉu en aliaj lingvoj. Kiel kutime, plena sukceso!

Soit dit en Passant : Dank'al riĉaj tekstoj, la grupo Soit Dit En Passant vojaĝigis tra nostalgio ĝis ĝojo. Ili prezentis kantojn, plejparte en la franca, kiuj portas la esperon de pli humana kaj solidareca mondo. Humuraj aŭ rea-

lecaj, iliaj kantoj permesas al la publiko sin rekoni, por pli bone kanti la vivon... Flavie Wakako Audibert kantetis kun ili en Esperanto.

Libera danco, inspirita de danco spektaklo «Hafu»

Flavie Wakako Audibert prezentis mallongan version de sia dancospektaklo «Hafu», pri la duobla kulturo, Francio - Japanio. Kaj ŝi skribas :

« Mi tre ĝojas prezenti tiun dancadon okaze de la kongreso en Marsejlo. Dank'al miaj gepatroj Kazue Sugawara kaj Michel Audibert (fama Esperanto-aktoro), mi fieras kontribui al la arta vicleco de la Esperanto-movado. »

## Nova kaj tre interesa afero, la Filmo «en quête de sens» kun esperantaj subtitoloj - Serĉante signifon

Partopreniga kaj civitana filmo de Nathanaël Coste kaj Marc de la Ménardièr

« Serĉante signifon » rakontas la inican vojaĝon de du amikoj ekde infanaĝo, foririntaj por pridemandi la funkciadon de la mondo.

Ekipitaj per malgranda filmilo kaj mikrofono, Marc kaj Nathanaël klopodis kompreni, kio alkondukis al la aktualaj krizoj kaj de kie la ŝanĝo povus alveni. El la mesaĝoj de agadistoj, filozofoj, biologiistoj, aŭ gardistoj de antikvaj kulturoj, ili invitas dividi siajn pridubojn. Temas pri serĉado kiu restarigas konfidon en nia kapablo pozitive influi la evoluon de la okazaĵoj. La ŝanĝo estas plenumata tra la mondo : ĝi estas ŝanĝo de konscio, instigita de la bezono vivi en harmonio kun si mem kaj kun la regno de la vivantaraĝo.

La filmo estas en la franca kun esperantaj subtekstoj.

## Loke manĝi (kaj trinki)

Dum la tuta kongreso funkciis trinkejeto, kiu proponis lokajn vinojn kaj aliajn trinkaĵojn.

Pastis-gustumado, kun akompanado de « tapenade » (olivanŝova pasto) prepa-

rita el la hejme rikoltitaj olivoj de Rosy Inaudi estis tre aprezata de ĉiuj.

La kongresa bankedo okazis en speciale elektita restoracio. La menuo proponis marsejlajn bongustaĵojn.

## Ekskursoj

La vizitoj okazis piede aŭ per publikaj transportoj. Ili kondukis ekzemple al la fama malnova haveno, al apudaj kvartaloj, kiel Le Panier (fama pro diversaj filmoj inspiritaj de verkoj de Marcel Pagnol). Kaj al la strato Canebière, la malnova Karitejo, nun muzeo, la katedralo, la Mucem muzeo, ktp.

Iu ekskurso okazis laŭ la plej bela fervoja linio, kiu malkovrigas la sovaĝajn pejzaĝojn kaj la golfon de Marsejlo kun insuloj, de Marsejlo al Port-de-Bouc, laŭ la tiel nomata «Blua Marbordo ». Pro manko da borda ebenaĵo, la fervojo, konstruita de 1907 ĝis 1915 estas sekvo de pontoj aŭ tuneloj, kiuj iĝis «heredaĵo de la XXa jarcento».

Alia ekskurso uzis la plej belan buslinion en Marsejlo, kiu sekvas la marbordon de la Malnova Haveno ĝis la haveno de Pointe-Rouge. Por pli bone aprezi la proprajn kvalitojn de Marsejlo, estis ŝipa reveno de Pointe-Rouge ĝis la Malnova Haveno.

Ne mankis ekskurso al Notre-Dame de la Garde, de kie estas unu el la plej belaj superrigardoj al Marsejlo. Tiu preĝejo estas la simbolo de Marseille, nomita «La bona patrino».

Kvar tagoj evidente ne sufiĉis por konatiĝi kun ĉiuj interesaĵoj de Marseille. Ni povas nur konsili: (re)venu al Marseille !

Claude Nourmont



Ero el la spektakla programo de la kongreso en Marseille

## Teatraĵo - La Viro-Semo<sup>(1)</sup>, Duvoĉa monologo de Violette Ailhaud. Teatre adaptita de Sylvaine Le Magadure. Kelkaj pripensoj

**E**n tre malgranda vilaĝo de sudaj alpoj, post 1852 tute ne plu restis eĉ unu viro.... kiel redoni vivon al tiu ĉi loko tiom amata de la virinoj ?

En 1851 Ludoviko Napoleono Bonaparto organizas sian propran ŝtatrenverson kaj fariĝas imperiestro. Tiucele, liaj armeoj sovaĝe punas la respublikanojn kiuj ribelas. En provenca vilaĝo kiu fervore luktis restas nur virinoj, kiuj devas plenumi ĉiujn taskojn, kaj pluvivi dum du jaroj, solaj kun timo, ĉagreno, fizika manko de viro sed ankaŭ kuraĝo kaj espero pri baldaŭa alveno de viro. Kaj jen, tio okazas.... Ĉu la ĵuro pri kiu ili interkonsentis fariĝos la plej bona ideo ?

La Cikadoj prezentis tiun spektaklon plurfoje dum la UK en Lille. Estis plezuro revidi ĝin en la regiono de kie ĝi originas.

Sed pri la historio ĉu vero aŭ legendo? ĉu aŭtentika rakonto aŭ fikcio ? Temas



pri manuskripto, kiun oni laŭdire retrovis laŭ iu obskura vojo. Laŭ la enkonduko al la libro Violette Ailhaud vivis siajn lastajn jarojn en Le Saule Mort, vilaĝeto en la komunumo Le Poil. Ŝi tie mortis en 1925. En ŝiaj heredaĵoj estis koverto,

kiun la notario ne rajtis malfermi antaŭ la somero 1952. Post malfermo de la koverto la instrukcio estis, ke la entenata manuskripto devas esti transdonita al la plej aĝa posteulino de Violette, nepre ina, kun aĝo inter 15 kaj 30 jaroj. Yvelyne, 24jara, ricevis la tekston de la libro en julio 1952.

Se oni iom esploras, oni trovas ke iu « Violette Ailhaud » ne ekzistis, almenaŭ ne sub tiu nomo. Ankaŭ la priskribita vilaĝo ne havis la sorton, kiun oni priskribas en la rakonto. Eblas kontroli laŭ la sinsekvaj popolnombroj. Kio veras, estas la ribeloj en Provenco kontraŭ la ŝtatrenverso de Napoleono, kaj la ĝenerala elmigrado el la vilaĝoj. Ankaŭ la nomo « Ailhaud » ne estas fremda, ĝi estas la nomo de unu al la ribelintoj.

Ŝajnas ke iu ekhavis genian ideon por revivigi tiun vilaĝon, kaj ĝi funkciis. Nun estas eĉ regule festivalo tie. Iuj supozas, ke la verkinto estas eĉ viro... Kial ne ?

(1) laŭ la esenco de la afero, la ĝusta titolo en Esperanto estas "La semo-viro".

C. Nourmont



Prelegvojaĝo

# Denove turneis Abduraĥman Junusov el Dagestano

**A**bduraĥman Junusov turneis de la 17a de majo ĝis la fino de junio. Li vizitis klubojn aŭ partoprenis aranĝojn en Lille, Antverpeno, Bruselo, Montivilliers (apud Le Havre), Saint-Brieuc, Hérouville, Châteauroux, Strasbourg, Dijon, Lyon, Gap, La Ciotat, Béziers, Toulouse, Périgieux, Limousin, Angers. Dank' al Didier Loison, kiu lin gastigis antaŭ lia forflugo, Abduraĥman povis ankaŭ renkontiĝi kun parizaj samideanoj.

Laŭ la raportoj, de 350 ĝis 370 homoj renkontis lin. Inter tiuj, lernantoj de mezgradaj lernejoj en Gap kaj Saint-Brieuc. En Saint-Brieuc, li renkontis ankaŭ 10 studentojn de ENSSAT (altlernejo por inĝenieroj kie Jérôme Caré instruas Esperanton kiel duan lingvon ĝis atingo de la nivelo B1).

Pro malfruaj datoj, parto de la kluboj ne organizis publikan kunvenon sed nur kluban renkontiĝon. Abduraĥman partoprenis ĝeneralajn asembleojn en Périgord kaj en Normandio. Por la publikaj kunvenoj, pluraj kluboj (Toulouse, Lyon, Hérouville, Limousin,) faris afiŝon kaj publike anoncis la aferon en gazetoj aŭ sur urbaj paneloj, sed ne sukcesis aperigi raporton en la lokaj gazetoj, krom en « L'écho, la Marseillaise » en Châteauroux.



Por organizi la renkontiĝojn, iuj kluboj kunlaboris kun diversgradaj lernejoj kaj lokaj asocioj. En La Ciotat kun CIRA (esplorcentro pri anarkiismo), en Hérouville kun kultura kafejo, en Limousin (Brive) kun Café des Langues. Bedaŭrinde, diverslokaj kontaktoj kun rusaj asocioj restis kvazaŭ senfruktaj. La kluboj elektis la temojn kiuj donas larĝan prezenton de Dagestano (krom Antverpeno kiu elektis la urbon Derbento). Tiuj prezentoj plaĉis « Altvalora kultura renkonto » (Lyon), « Bonega vespero kun plaĉa prezento, mankis nur iom da tempo por pli da interŝanĝoj » (Dijon),

« ŝategis historion » (Angers), « ankaŭ la filmojn » (Lille), « ne perfekta sed interesa kaj aprezata prelego » (Bruselo), « flua lingvo » (La Ciotat), sed « iom tro rapide por komencantoj » (Strasbourg). « Iu instruisto malkovris la ekziston de tiu lando ! » (Gap), « multaj demandoj, prelego tre konvena » (Lyon).

Ĉiuj, unanime, laŭdas la homajn kvalitojn de Abduraĥman. « A. estas tre simpatia homo kiu tute ne hezitas paroli kaj ŝerci » (Angers), « ni pasigis tre agrablajn kaj instruplenajn momentojn kun A. » (Hérouville), « tre afable respondis al multaj demandoj, ĉio interesas lin » (Châteauroux), « tre agrabla gasto » (Lille), « facila gasto » (Limousin).

Malgraŭ tro ofte aĉa vetero kaj inundoj, malgraŭ malakurataj trajnoj kaj mistrakitaj rendezuoj, videble tiu dua turneo (la unua, same fruktodona, okazis en 2002) estis tre sukcesa dank' al elstara preleganto kiu tuj poste forflugis al Litovio por partopreni la faman BET (Baltiaj Esperanto-Tagoj).

Por la ontaj turneoj, Toulouse deziras, ke la kluboj interŝanĝu siajn informojn kaj materialon por « havi komunan pakon por ĉerpi taŭgajn elementojn ».

Grandan dankon al Abduraĥman kaj al vi ĉiuj.

Yves NICOLAS



## Prelegvojaĝo

# Sinteza raporto pri la turneo de Saeed Ahmad el Pakistano

**D**um UK en Lille, mi proponis al Saeed prelegvojaĝi en Francio. La turneo efektiviĝis de la 14<sup>a</sup> de marto ĝis la 14<sup>a</sup> de aprilo. Saeed vizitis Le Mans, Rennes, Angers, Tours, Gironde, Toulouse, Tarn, Ariège, Vendée, Périgueux, Limoges, Bourges kaj aldone Bruselon. Guy Cavalier el Parizo multe helpis, ĉar li atendis nian amikon por faciligi la kontakton kun la Blablacar-ŝoforo por iri de Roissy ĝis Le Mans.

En ĉiuj kluboj estis organizitaj publika(j) kunveno(j), kiujn ĉeestis proksimume 260 homoj (ĉirkaŭ 50 estis ne-esperantistaj). Plej ofte pritraktita temo estis « Sufismo » sed ankaŭ « Vivo en Panĝaba vilaĝo » estis ofte elektita. La prelegoj tre plaĉis en plej multaj kluboj. « Plaĉis al ĉiuj » (Bourges), « interesa prelego. La publiko miris sed estis bona etoso » (Gironde), « multe lernis pri la loka vivo » (Le Mans), « Bone ilustrita prelego » (Tours), « La publiko starigis relative multajn demandojn » (Périgueux), « Plaĉis ĉar pri lando malbone konata » (Rennes), « Tre bela renkontiĝo » (Tarn), « Saeed bone adaptiĝis al la deziro de la publiko » (Limoges). « Tre interesa prelego » (Bruselo). Tamen ankaŭ kelkaj kritikoj estas legeblaj: « Bedaŭrinde parolis pri pli Pakistano ol pri Sufismo » (Bordeaux), « Apenaŭ parolis pri la anoncita temo » (Angers), « Kelkfoje

iom senorda » (Limoges), « Li kelkfoje tro rapide parolis, malfacile por la tradukisto » (Le Mans), « Ŝatus ke la prelego estu pli preciza, malpli vasta » (Rennes). En Lavaur, ŝokis iujn lia vidpunkto pri la virinoj.

## Saeed intervenis kadre de la Esperanto-semajno en Tuluzo

Nur en Bourges, gazeto aperigis raporton malgraŭ informado de kvazaŭ ĉiuj kluboj. En Toulouse, okazis intervjuo en loka radio-elsendo kaj Saeed intervenis kadre de la Esperanto-semajno. En Gironde, li intervenis en Universitato Montaigne, kie instruas Elvezio Canonica. La aliaj kluboj ne organizis publikan kunvenon en kunlaboro kun aliaj asocioj aŭ instancoj.

Se oni apartigas la alergian problemon (vidu ĉi-sube la tekston de Saeed), videble la restado en ĉiuj kluboj tre bone okazis. « Tre agrabla gasto » raportas Bourges, « Multe interesiĝis pri nia vivo » diras Le Mans, kie Saeed ankaŭ emocie renkontiĝis kun Zef Jegard kiu venis kun samideanoj de Flers por lin aŭskulti.



konfirmas Angers kaj Limoges. Tours aldonas, ke « estis vera plezuro gastigi kaj promeni lin », « li multe ŝatis la viziton en Lascaux » (Périgueux). « La gastiginto estis feliĉa renkonti lin » skribas Rennes, dum Gironde bedaŭris, ke « li restadis nur unu tagon ».

## La gastigantoj plej ofte ŝatis la renkontiĝon kun Saeed

Prelegvojaĝoj estas despli interesaj kiam la preleganto venas de kulturo kaj kredoj tute malsamaj. Videble pro tio, la publiko kaj la gastigantoj plej ofte ŝatis la renkontiĝon kun Saeed. La raportoj de Saeed kaj de la kluboj konfirmas, ke regis bona etoso. Aliaj raportoj kaj fotoj estas videblaj en « Espéranto-Aktiv' » kaj en la repaĝaro de Toulouse.

Grandan dankon al Saeed pro lia entuziasmo kaj scivolemo. Grandan dankon al ĉiuj kluboj kiuj akceptis lin kaj organizis interesajn aranĝojn.

Yves Nicolas

## Raporto de Saeed (eltiraĵo)

Mi sentis min tre bone kaj notis feliĉe, ke estas mia bonŝanco ke inter miaj gastigantoj kaj eĉ la ĉeestantoj dum miaj prelegvojaĝoj estas bone edukitaj homoj kiuj amas kaj respektas min. Mi dankegas al Dio ke Li konatigis min kun Siaj



Zef raportis en fama libro « Papy fait le tour du Monde » sian bicikladon de Pakistano (kie li estis gasto de Saeed) ĝis Vladivostoko. « Simpatia homo », « Afabla, diskreta »



belkoraj homoj.

Multaj inter ili estis miaj samaĝuloj aŭ pli aĝaj, kaj pro tio mi ne havis iun problemon dum miaj prelegoj. Ili bone aŭskultis min kaj ili dankis min. Mi pensas ke ili bone komprenis miajn sentojn pri la tri temoj.

### Estas malfacile gastigi iun homon kiu ne estas samkulturano

La plia parto de la vetero ankaŭ restis afabla dum mia prelegvojaĝo. Estis nuboj, tamen plurfoje estis sunaj kaj brilaj tagoj. Mi ege ŝatis la puran aeron kaj purajn restadojn. Mi neniam forgesos mian restadon en la urbetoj en la kamparoj, kie mi manĝis la naturajn ovojn de la kokinoj kaj legomojn.

Mi venis el tute alia religie plenefika kulturo. Ĝenerale, estas malfacile gastigi iun homon kiu ne estas samkulturano kaj eĉ pli malfacile gastigi iun islamanon, sed mi sentas ke ili multe toleris min kaj vere respektis mian kulturon. Unu aferon mi ege bedaŭras, kaj pro ĝi mi pardonpetas al ĉiuj miaj tre respektindaj amikoj, ke malfeliĉe mi havas alergion pri fumado kaj bestoj. Mi menciis pri la fumado al mia tre kara S-ro Yves Nicolas, sed mi ne volis menciĝi pri mia alergia al bestoj. Kaj mi sentas ke mi bedaŭrinde ĝenis miajn kelkajn amikojn kiuj ege amas bestojn. Mi neniam havis tiun ĉi sperton antaŭe. Por mi estis malfacile resti ĉe ili pro mia tute aparta kulturo. En unu urbo mi restis en la domo de unu tre bona kaj afabla amiko, sed li havis unu grandan nigran katon, kiun li amegis ĉiam kaj eĉ portante

lin li ofte kisis lin multfoje. Tiu ĉi kato tutnokte frapis, kraĉis kaj fosis la pordon de la ĉambro kie mi klopodis dormi kaj mia lito estis apud la pordo.

### Mi lernis multon dum mia turneo

En la domo de unu mia tre estimata kaj ege afabla amiko estis unu hundo kiu ĉiam bojis kiam ajn mi venis malsupren. Estis mia eraro, ke mi ne volis menciĝi al S-ro Yves Nicolas. Mi ege pardonpetas al ĉiuj amikoj pro mia tiu ĉi reago (malbona konduto). En unu urbo dum mia restado en Francio, amiko eĉ diris al mi tiun ĉi proverbon: "Se iu ne ŝatas la infanojn kaj bestojn (katojn kaj hundojn ktp), oni ne konsideras lin homo."

Eble jes, eble ne.

Mi lernis multon dum mia turneo kaj mi elkore dankas al S-ro Yves Nicolas kaj ĉiuj amikoj. Mi ankaŭ elkore salutas la grandan spiriton de D-ro Zamenhof kiu donacis al la tuta homaro unu belegan lingvon kiu povas ludi plej gravan rolon, speciale en nuna epoko kiam la mondo dividiĝas en diversaj etnaj, religiaj kaj regionaj kampoj.

### Nia mondo bezonas pacon kaj Esperanto povas helpi nin

Vere nia mondo bezonas pacon kaj Esperanto povas helpi nin.

Fine, denove mi elkore aplaudas la agadojn de okcidentanoj, speciale francaj amikoj, kiuj fortigas la Esperanto-movadon pli kaj pli per siaj altnivelaj agadoj por la lingvo.

Mi opinias ke mia tiu ĉi vizito al Francio kaj Belgio alportis por mi gravajn renkontiĝojn kun la ge-esperantistoj de ambaŭ landoj kaj mi esperas, ke la unumonata vizito helpos vigligi nian movadon por la neŭtrala lingvo. Kaj mi esperas ke tiaj prelegvojaĝoj de Esperantistoj en diversaj landoj estu tre fruktodonaj kaj mi esperas ke ili restos ĉiam daŭrigataj.

Vivu nia Esperanto-movado.

Amike,

Saeed Ahmad

The logo for 'edukado.net' features the word 'edukado.net' in a stylized, 3D font. The letters are primarily blue and green, with a globe-like texture.

# Nova pedagogia staĝo kun Katalin Kováts

**Kulturcentro Kvinpetalo, en Bouresse, 10a-14a de aprilo 2017**

Katalin Kováts, redaktoro de edukado.net kaj sperta trejnisto de Esperanto-instruistoj gvidos **5-tagan seminarion** celantan pripensi kaj praktike prepari intervenojn enkadre de TAP/NAP en la elementaj lernejoj, kaj atelierojn en gimnazioj kaj liceoj.

Por plene profiti el la seminaria laboro necesas, ke la partoprenantoj estu je minimume B2-nivelo en la lingvo.

Similtema seminario jam okazis en oktobro 2016, kaj tiu ĉi en aprilo povas esti ĝia daŭrigo kaj kompletigo kiu bilancos la intervenojn en lernejoj, prezentos la spertojn, diskutos la eventualajn problemojn. Tial ni atendas kaj la partoprenintojn kaj novajn kandidatojn por plivastigi la laborkomunumon, kies kerno jam nun kunagadas en speciala forumo ĉe edukado.net.

La datoj de la staĝo indikas la unuan kaj la lastan tagojn. Oni prefere alvenu la antaŭan tagon.

**Gravas tiu ĉi staĝo ! Ĝi okazas dank'al la subteno de Klubo 2000, kiu ebligas la venigon de elstara pedagogo. Nepre kaptu tiun novan okazon !**

Informoj pri restadkondiĉoj, aliĝo, tarifoj : <http://www.kvinpetalo.org>

Akceptejo kaj poŝta adreso :

KVINPETALO 4 rue du Bureau FR-86410 BOURESSE

Retadreso: [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)

Telefono : +33 (0) 549 034 314

Literature

# Pensigaj verkoj de Zlatko Tišljar

**E**kde mia translokiĝo al Slovenio oni ofte min demandas, kial mi ne fariĝas sloveno, en Kroatio oni demandas min, kial mi defendas slovenojn, mi ja estas kroato... Ambaŭ postulas, ke mi decidu, ĉu mi estas unu aŭ alia.

Nur esperantistoj neniam postulis de mi ŝanĝi mian nacian apartenon. Kontraŭe, ili eĉ tre interesiĝis pri ĝi.

Zlatko Tišljar

La supra citaĵo kvazaŭ resumas la filozofion de du elstaraj libroj de Zlatko Tišljar, eminenta promocianto de Eŭropo kaj de Esperanto en Eŭropo. Hazarde mi trovis reklamilon pri eseo, kiu tuj kaptis mian atenton. Tion sukcesis la ŝoka titolo: Eŭropo, vi baldaŭ mortos\*. Post mendo mi ege miris, ĉar ĝi aperis jam en 2005 kaj mi, kiel avida traserĉanto de novaj aperigoj, ĝin neniam rimarkis. Mi konfesu, ke tiuepoke la ideo de disfalo de Eŭropo ankoraŭ ne tiom akre esprimiĝis en la amaskomunikiloj. Post tralego mi ne iĝis pli optimisma koncerne la pluvivon de Eŭropa Unio, sed la aŭtoro sukcesis min persvadi, ke Esperanto „estintus“ – ĉu eble pli optimisme „estus“ – grava ilo por demokrata federacia Eŭropo. Necesus eĉ diri: eble la plej grava ilo. Ne malkredu! Legu la eseon!

Kroata samideanino atentigis min pri ĵus aperinta plia verko de Pajo (Zlatko Tišljar): NEKUTIME PRI MULTIO Eseoj kaj artikoloj\*\*. Ĝi konsistas en 78 artikoloj pri la temoj biografioj, esperantaĵoj, filozofio/etiko, lingvistiko, pedagogio, politiko, recenzoj. Enestas eĉ du personaj poemoj. Tio signifas, ke la leganto povas adapti la legadon al la disponebla tempo kaj al siaj laŭtemaj preferoj.

Sciante ke Zlatko Tišljar naskiĝis en la jaro 1945 en Zagrebo (Kroatio), ke li studis en la filozofia fakultato pri la germana lingvo kaj socihumanisma informatiko, ke li estris la esperantistan



entreprenon IKS (Internacia Kultura Servo) en Zagrebo, ke li tie organizis la Pupteatran Internacian Festivalon (PIF), ke li estis la motoro de la Zagreba Metodo adaptita al pli ol 30 lingvoj, ke li magistriĝis en 1995 pri kibernetiko ĉe la Internacia Akademio de Sciencoj San Marino, ke li estas membro de la Verda Partio de Slovenio kaj pinta aktivulo en EEU (Eŭropa Esperanto-Unio), vi certe komprenos, ke ĉi artikolaro estas ia vivmonumento de erudicia samideano, ĝisosta esperantisto, kies esperantisteco

tutnature integriĝas en sian ĉirkaŭaĵon, kiun li analizas plej akravide kaj racie. Ni nur esperu, ke ĉi libro ne restos lia lasta! Ja multegon ni povas lerni dank'al li! Krome: admirindas la laboro de liaj skipoj.

Edmond LUDWIG

\* Eŭropo, vi baldaŭ mortos, kopirajto 2005 Zlatko Tišljar, 63 paĝoj

\*\* NEKUTIME PRI MULTIO Eseoj kaj artikoloj Zlatko Tišljar – Pajo Zagreb 2015 231 p. Eldonejo IZVORI

## Dum la Universala Kongreso

# Belartaj konkursoj

**G**ratulojn al i.a. niaj samlandanoj!

BRANĈO PROZO

- Unua premio al Jesper Lykke Jacobsen (foto ĉi-dekstre), Francio, pro «La paradiza turo»
- Dua premio al Lenke Szász-Praid, Rumanio, pro «La heliko kaj la lacerto»
- Tria premio al Ewa Grochowska, Francio, pro «Malbenitaj skaraboj»
- Tria premio al Amir Naor, Israelo, pro «Anĝela»
- Honora mencio al Steven D. Brewer, Usono, pro «Krepusko sub fago»



Evoluo kaj evoluigo de la internacia lingvo de Esperanto

# La 39-a Esperantologia konferenco

**G**i okazis dum la 101-a Universala Kongreso de Esperanto sub la aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj. La temo estis « Evoluo kaj evoluigo de la internacia lingvo de Esperanto : diversspecaj influoj kaj faktoroj ». Partoprenis ĉ. 80 personoj. Reĝisoris Maria Rosaria Spanò kaj Orlando E. Raola.

Dum la Esperantologiaj Konferencoj fakuloj pri lingvistiko raportas pri siaj laboraĵoj koncerne Esperanton. Tamen ŝajnas, ke tiu evento de la Universala Kongreso ne tro furoras en la gazetaro. Ĉu tio estas pro la trouzado de fakaj vortoj ? Ĉu oni juĝas esperantologion tro malfacila aŭ tro scienca por informi pri ĝi ĉefe nur en la fakaj informrimedoj ?

Multaj fakaj vortoj estas troveblaj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV). Ekzemple « esperantologio », *lingvistika studo de Esperanto* ; « ingvistiko », *lingvoscienco* ; « interlingvistiko » *scienco, kiu esploras la kondiĉojn lingvosciencajn, kulturajn kaj sociologiajn de komuna norma lingvo, uzebla en la internaciaj rilatoj*. Por ne-PIVaj vortoj ni provos klarigi ilin, kiam ili aperas en tiu prezentado de la kvin esperantologiaj prelegoj de Nitro.

## « Lingvo Internacia » aŭ « internacia lingvo » ?

**Kelkaj konsideroj pri la origina nomo de Esperanto en diakrona perspektivo.**

**Federico Gobbo (Universitato de Amsterdamo, Universitato de Torino, Universitato Milano-Bicocca)**

En la unuaj priskriboj de la gramatiko de Esperanto kaj en siaj Lingvaj Respondoj, Zamenhof donis multan atenton al morfologio, t.e. la vortformado, kaj kompare malmultan atenton al sintakso, t.e. la vortordo. Ĉiuj lingvistoj



scias, ke vortordo neniam tute liberas. Esperanto ne estas escepto. Per la konkreta lingvouzo en la originaj tekstoj la lingvo rapide stabiligis. Laŭ la korpusaj analizoj de Esperanto la baza vortordo estas SVO (subjekto-verbo-objekto). Aliflanke, okaze de la vortordo de nomoj (N) kaj adjektivoj (A), ambaŭ ordoj AN kaj NA eblas, eĉ se AN nepre pli oftas.

Laŭ la Oftecvortaro de Esperanto la vortoj « internacia » kaj « lingvo » troviĝas en la plej alta oftocoklaso de la tuta oftcevortaro, kaj tiel alta vortofteco estas pruvo pri ilia graveco en la kulturo de la lingvo. La esprimo « Lingvo Internacia » estas listigita kiel grava esperantonimo kiel « origina nomo » de Esperanto. Tiel Zamenhof nomis sian lingvon origine (i.a. en la grava eseo Esenco kaj Estonteco de la Ideo de la Lingvo Internacia). La nomo « Esperanto » fakte estis la plumnomo, kiun li uzis por lanĉi la lingvon. La esplordemandado estas: kial Zamenhof preferis nomi Esperanton Lingvo Internacia, per markita ordo NA, anstataŭ internacia lingvo ?

La formo « internacia lingvo » komencis oftigi unue en Sennacieca Asocio Tutmonda kaj iom post iom la vortordo « lingvo internacia » estis konsiderata

pionirstila kaj ne plu moda. Nuntempa uzo en esperanta gazetaro preskaŭ ekskluzive uzas formon « internacia lingvo » kaj la formo « lingvo internacia » aperas nur kiam oni referencas al frutempaj tekstoj.

Federico Gobbo prezentis diversajn konsiderojn pri la pranomo en diakrona (t.e. tratempa) perspektivo, komparante la uzon de la esprimoj « Lingvo Internacia » kaj « internacia lingvo » per korpusoj de Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj, kiuj verkis en la lingvo en diversaj momentoj de ĝia historio. Konklude, la tezo de Gobbo estas ke Zamenhof konscie uzis la markitan vortordon NA por substreki la specialecon de Esperanto.

## Ĉu necesas evoluigi Esperanton ?

**François Lo Jacomo (doktoro pri lingvistiko)**

François Lo Jacomo komencis rememorigi, ke antaŭ pli ol kvardek jaroj, lia profesoro pri lingvistiko André Martinet instruis al li, ke « lingvo evoluas ĉar ĝi funkcias ». Do, por konvinki lingviston, ke Esperanto estas vivanta lingvo, necesas pruvi, ke Esperanto kapablas evolui « same » kiel naciaj



lingvoj. Sed la evoluo de lingvo povas deveni de multaj kaŭzoj. Ĝi povas veni de evoluo de la socio.

En la franca lingvo ekestis antaŭ kelkaj jardekoj la bezono de nova vorto por tiu, kiu lernas ekster la « normala lerneja » medio, ĉar pli kaj pli diversiĝis la maniero lerni. Tial enkondukiĝis la vorto « apprenant » lernanto. En Esperanto, ne estas simila bezono. Ekde la komenco, Esperanto-lernantoj lernas ekster la lerneja medio, kaj se ja necesas specife mencii tiun, kiu lernas en lernejo, ni simple uzu la vorton lerneĵano.

En nacia lingvo, evoluo povas rezulti ankaŭ de politika decido. Ekzemple, antaŭ kvar jaroj la franca ĉefministro decidis malpermesi la uzon de la vorto « fraŭlino » en administracio, kaj tio jam estas aplikata en lernejoj, trajnoj... supozeble tio kreas lingvan evoluon. Ĉu ekzistas tiom aŭtoritataj decidoj en Esperantujo ? Analizante la diversajn kaŭzojn de evoluo de etnaj lingvoj kaj de Esperanto, oni evidente konstatas diferencojn. Tamen la ideo, ke kiel planlingvo, Esperanto ankoraŭ devas esti evoluigita per aŭtoritataj decidoj kaj ne estas sufiĉe matura por evolui mem estas refutebla.

## La jidogramatiko de Zamenhof kaj lia Lingvo universala

**Christer Kiselman (emerita profesoro pri matematiko)**

Christer Kiselman prezentis la klopodon de Zamenhof verki gramatikon de la jida "ĵargono", kiu estis en lia tempo parolata, sed ne havis gramatikon. Zamenhof uzis modernan lingvistikan metodon, kiun li poste ankaŭ aplikis ĉe Lingve universale kaj poste ĉe Esperanto mem. Zamenhof verkis gramatikon pri jido ĉirkaŭ 1880. Mallonga raporto pri ĝi estis publikigita en la revuo *Leben un vissenŝaft* en 1909, sed plene ĝi aperis nur en 1982.

La gramatiko estas verkita en la rusa lingvo kaj science priskribas jidon, sed la aŭtoro strebis ankaŭ al unuecigo de la lingvo, kiu estis parolata en multaj

dialektoj. Temis pri elekto inter pluraj prononcoj kaj pri decidoj pri gramatikaj trajtoj. Tial la verko enhavas normigajn elementojn. Zamenhof studis medicinon en la Imperiestra Moskva Universitato dum du jaroj, de aŭgusto 1879 ĝis aŭgusto 1881, kio signifas ke, kredeble, la ellaborado almenaŭ parte okazis en Moskvo. Li proksimume samtempe ellaboris lingvon nomatan Lingvo universala, kiu estas pluevoluigaĵo de lia Lingve uniwersala (Bjalistoko 1878) kaj antaŭiranto de Lingvo internacia publikigita en Varsovio en 1887. Christer Kiselman montris ke ekzistas similecoj inter la du lingvoj jido kaj Lingvo universala.

Christer Kiselman por sia prelego plukis el verko pri kiu li laboradas. Espe-reble ĝi iam aperos. Tio estos grava evento por interlingvistiko, jida lingvo kaj historio de Esperanto.

## Juda fantomo en ĉinaj skatoloj: la rolo de la judeco de Zamenhof en la historio de Esperanto

**Maria Rosaria (Sara) Spanò (doktoro pri klasika filologio kaj literaturo)**

En tre konata letero al Alfred Michaux (14.III.1905), L.L. Zamenhof skribas, rakontante pri sia vivo: « Se mi ne estus hebreo el la geto, la ideo pri la unuigo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo. La malfeliĉon de la homara disiĝo neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo el la geto »

Plene sentema pri la kondiĉo de sia popolo, antaŭtempa pasia cionisto, Zamenhof transiris el fokuso je la hebrea popolo al plej ampleksa vido kaj idearo concernanta la tutan homa-



ron, kaj laŭ la lingva kaj laŭ la ideo perspektivoj. En la *Unua Libro* (1887), Zamenhof mem komparis la transiron de cionismo al Esperanto al la transiro de la rivero Rubikono en 49 a.K. fare de Julio Cezaro, do al findecida, neforviŝebla ago.

La judeco de Zamenhof daŭre ludis gravan rolon dum la tuta intelekta kaj ideo itinero de Zamenhof. La tuta vojo – inter kies mejloŝtonoj ĝis la formulado de la interna ideo menciindas Hilelismo kaj Homaranismo – estis konstante karakterizata, laŭ la jam menciita letero al Michaux, de konstantaj bataladoj internaj kaj eksteraj – ĉiuj [...] nedisi-geble ligitaj cetere kun la juda identeco de Zamenhof.

D-ino Esther Schor, docento ĉe la Universitato de Princeton, en sia eseo Esperanto: a Jewish History, difinis la historion de Esperanto “serio da ĉinaj skatoloj enhavantaj judan fantomon”. Maria Rosaria Spanò strebis “malfermi la skatolojn” kaj retrorigardi la historion de Esperanto laŭ tiu ĉi perspektivo de la engaĝiĝo de Zamenhof en la hebrea movado, por kiu li verkis plurajn artikolojn sub la nomo Gomo sum (Homo sum Mi estas homo) ĝis lia plena formulado de la “interna ideo” (Krakovo 1912).

## Ontologioj : Alproksimiĝo al la Esperantologio

**Ariadna García Gutiérrez (Universitato de Havano)**

Ariadna García Gutiérrez prelegis surbaze de sia diplomlaboraĵo “Dizajno pri

Jen Raola,  
Spanó, Gobbo,  
Kiselman.



baza ontologio de la Nacia Kongreso de Esperanto”, kiun ŝi verkis fine de siaj unuaj universitataj studoj pri informaj sciencoj. Tiuj sciencoj temas pri bibliotekologio, arkivologio, muzeologio kaj ĉio rilate al la novaj teknologioj pri informado kaj komunikado (mastrumado de informoj en la reto, ĝia organizado kaj reprezentado – fakte ontologioj - por pli bona kaj sencohava reakirado de tiaj informoj).

En informadiko la vorto ontologio, prefere ontologioj, signifas sistemojn por organizi kaj reprezenti informojn pri specifa kampo tra terminologiaj kaj konceptaj specifaĵoj en formala lingvo (maŝin-komprenata), kun la celo plifaciligi la serĉon de informoj per semantikaj interkompreniĝoj inter uzantoj kaj inteligentaj programaroj.

Organizi kaj reprezenti informojn konsistigas unu el la grandaj defioj nuntempaj, kie je pli vastaj niveloj produktiĝas informoj en la ĉiutaga vivo, des pli pro la alveno de la novaj teknologioj pri informado kaj komunikado. La scienca agado en Esperantujo, opinias Ariadna García Gutiérrez, estas unu el la plej malfacilaj agadkampoj, ne pro la fakto “sciencumi”, sed pro la atingeblecoj ofertataj de Esperanto el scienca vidpunkto al la socio, pli ekzakte dirite al la ne-esperantistoj. Gravus verki, traduki al Esperanto por esperantistoj, sed ankaŭ verki pri Esperanto kaj montri la agadon de la komunumo kaj la valorojn atingeblajn

pere de tiu agado kaj kiom riĉa povas esti la lingvo socie, ekonomie, lingvistike, kulture kaj praktike.

Surbaze de sia diplomlaboraĵo Ariadna García Gutiérrez celis ne nur prezenti la lingvon al la ne-esperantista scienca komunumo, sed atingi bibliografian verkon kaj praktikan aplikadon pere de ontologioj. Samkiel la ontologioj, ekzistas pluraj sistemoj por organizi kaj reprezenti informojn ne nur laŭ tradicia maniero sed ankaŭ reta. Tial prezenti ilin evidentigas sciencan evoluon por la movado kaj la lingvo nepreteratentenda, ĉar ĝi kontribuas al la lingva evoluigo. La ontologioj kaj iliaj praktikaj kaj retaj aplikoj gravas ankaŭ por la evoluigo de Esperanto kiel faka lingvo.

## Konkludo kaj estonto

### Orlando E. Raola (doktoro pri kemio)

Dum la venonta Universala Kongreso en Seulo okazos la 40-a Esperantologia Konferenco. Tio povus esti okazo rigardi malantaŭen kaj skribi, trakti kaj prelegi pri la historio de esperantologio. En Nitro, Orlando Raola diris, ke li ŝatus dediĉi la venontan Esperantologian Konferencon al analizo de la multaj manieroj laŭ kiu ĵurnalismo influis la evoluon de Esperanto. Estas konata fakto, ke la unua ĵurnalisto en Esperanto estis Zamenhof mem, ĉar li bone komprenis la gravecon de la tasko distili la ĉiutagaĵojn en konkretan raporton per la ĵus publikigita linvgoprojekto, do tiu ĵurnalisma agado ege helpis la projekton fariĝi lingvo.

Cele al tiu artikolo, Orlando Raola klarigis, ke rilate la Esperantologian Konferencon en Seulo li ankoraŭ ne ricevis konfirmon de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj pri la temo kaj la organizado. Tamen pro la subita forpaso de Detlev Blanke la gvida temo de la venontjara Esperantologia Konferenco povus esti omaĝo al tiu giganto, unu el la kreintoj de la Konferenco.

Bernard BEHRA

## Sciencfikciaj verkoj

# Antaŭ 150 jaroj George Wells

**A**ntaŭ 150 jaroj naskiĝis Herbert George Wells, precize la 21-an de septembro 1866 en Bromley, Kent. Li iĝis fama precipe pro siaj sciencfikciaj verkoj, sed verkis ankaŭ nefikciaĵojn kiel la faman Outline of History («Skizo de historio», 1920), kiu estis la unua ĝenerala historio verkita surbaze de antropologio kaj sociologio.

En Esperanto aperis *Strut-Maklero*, novelo (tradukis Martyn Westcott); *La dormanto vekigis*, romano (tradukis A. Frank Milward); *La tempo-maŝino* kaj *La lando de la blinduloj* (tradukis E. W. Amos); *La Milito de la Mondo* (Esperanto-traduko de mallongigita kaj bildigita versio de The War of the Worlds, vidu bildojn ĉi-apude).

La eldonejo Bero en Rotterdam reeldonis tri verkojn de H. G. Wells, *La lando de la blinduloj*, *La tempo-maŝino*, *La dormanto vekigis*.

Jen recenzo de Donald Broadribb pri *La lando de la blinduloj*.

## Malutopio

Eldonejo Bero, en sia Serio utopia, reeldonis ĉi tiun kuriozan novelon de H. G. Wells. Konforme al la tradicia strukturo de rakontoj pri fantaziaj landoj Wells komencas per priskribo de mirinda, kaŝita, monta landeto en Andoj, kiu, pro natura katastrofo, estis apartigita disde la cetera kontinento, tiel ke neniu povis eniri, nek eliri. La landeto konsistis el tre fekunda valo, kun preskaŭ ĉio bezonata por la vivo. Sed mistera malsano atakis la malgrandnombran loĝantaron de tiu landeto, tiel ke la vidpovo de ĉiuj homoj malfortiĝis, iliaj idoj naskiĝis blindaj, kaj fine ĉio, rilatanta al la kapablo vidi, estis forgesita. Kompense pro la blindeco la aliaj sensoj de la loĝantoj

# naskiĝis Herbert

akriĝis. Ili kapablo palpi, aŭdi eĉ plej etajn sonojn, flari ktp estas nekredible granda.

Montogrimpisto trafalas neĝfendegon kaj post multa peno trovas sin en la lando de la blinduloj. Tie la geloĝantoj konvinkiĝas, ke li estas freneza, pro lia konstanta parolado pri „vido”. Kaj, malgraŭ multaj provoj fare de li, montriĝas, ke ili, per siaj akraj sensoj, povas superi lian vidpercepton.

Iom post iom li enamiĝas al knabino, kies bela aspekto egalas al ŝia karaktero beleco. Ili volas geedziĝi. Sed oni postulas, ke por ke tio estu ebla, li devos esti blindigita. Kontraŭvole li konsentas.


Tamen, preskaŭ lastmomente, la beleco de la naturo, de la montoj, de la ĉielo, bedaŭrigas lin pri lia konsento. Li eskapas, reiras al la civilizacio kaj miras pro sia iama preto akcepti blindiĝon.

„Utopieca” estas tiu Lando de la Blinduloj nur tiusence, ke malgraŭ sia plena blindeco la loĝantoj de tiu lando havas ekspertajn inĝenierojn, konstruistojn, skulptistojn, poetojn, kapablas detale detekti kaj koni direktojn ktp. Ili ankaŭ havas proprajn mitologion, religiemon, imagatan sed detalan koncepton pri la strukturo de la „universo” (= la fermita valo, en kiu ili loĝas).

La novelo estas tre Wells-eca: kiu amas la sciencfikcion de H. G. Wells, tiu trovas ĉi tiun eldonaĵon salutinda. Ĝi estas tre bone kaj klare presita, kaj komposteraroj maloftas. La etoso de la pensomondo de Wells ĉirkaŭ la jaro 1900 estas tre evidenta.

H. G. Wells, *La lando de la blinduloj*. Tradukis el la angla E. W. Amos. Dua eldono. Eld. Bero, Rotterdam, 2006. 26 paĝoj vinktitaj.

(laŭ informoj de André RUYSSCHAERT)



Produktado de pedagogia materialo

# Internacia Pedagogia Film-Festivalo de ILEI

**T**iu konkurso enkadriĝas en la JARO DE LA LERNANTO, lanĉita de UEA kaj ILEI en julio 2016 dum la UK en Nitra.

**Celoj :** Kolekti filmetojn pri la lingvo. Tiuj filmetoj estos utilaj lerniloj. Allogi junulojn al kreado kaj pripensado pri transdono de scioj.

**Du kategorioj :**

- Kategorio “lingvo” kun maksimuma daŭro de unu minuto
- Kategorio “interkultura harmonio” kun maksimuma daŭro de tri minutoj

**Ekzemploj :** En la kategorio “lingvo” oni povus prezenti jenon: ĉevalo, ĉevalino, ĉevalido, ĉevalejo ; poste hundo, hundino, hundido, hundejo, ktp. Oni povus prezenti jenon, kun kalendaro: mi trinkis, mi trinkas,



mi trinkos... En la kategorio “interkultura harmonio” oni povus rakonti kortuŝan epizodon inter blankula infano helpata de nigrula persono, aŭ ian renkontiĝon inter diversetnaj personoj...

**Partopreno :**

Rajtas partopreni ĉiuj ! Profesiaj kaj amatoraj reĝisoroj, filmŝatantoj, fotistoj, ĵurnalistoj kaj kreemaj homoj el la tuta mondo. Ne nur esperantistoj, sed ankaŭ ne-esperantistoj ! La aliĝo al la

konkurso estas senpage. Limdato por sendi filmojn estas la 30a de aprilo 2017.

La filmo estu en la formato MPG-4, MP4. La filmo ne rajtas havi pli ol 100 Mo. Estas permesitaj desegnaj, muzikaj, dokumentaj, teatraj filmoj kaj aliaj.

Uzeblas iu ajn aparato por filmado, ekz. poŝtelefono, filmkamero kaj similaj. La filmo estu en Esperanto. Ĉiu partoprenanto rajtas sendi pli ol unu konkursaĵon ; ĉiu persono rajtas prezenti po du filmetojn en ĉiu kategorio, do entute maksimume 4 filmetojn. Ĉiu partoprenanto rajtas gajni unu premion maksimume.

La kompletan regularon vi trovos ĉe <http://www.ilei.info/novajxoj/regularoIPEFFrev2016-09-18.pdf>

Konkurso de mallongaj filmoj

## «Teo kaj amo», konkurso de mallongaj filmoj

**J**am kolektiĝas la konkursaĵoj por la dua konkurso de mallongaj filmoj «Teo kaj Amo». La limdato estas la 30-a de novembro 2016, kaj aprile 2017 en la ĉina urbo Hangzhou okazos la premidona ceremonio kaj la filmfestivalo «TEO KAJ AMO». En ĝi la premioj senpage partoprenos, sendepende de la loko kie ili loĝas en la mondo.

Kiel nia lingvo Esperanto, teo povas roli kiel perilo por amo. Bonvolu rakonti per filmeto pri teo kaj amo, vi havos ŝancon senpage vojaĝi al Ĉinio. Foje diris Julio Baghy: «Amo kreas pacon, paco konservas humanecon, kaj humaneco estas la plej alta idealismo.» Amo estas la kerno de nia lingvo Esperanto. Kaj Teo, kiun trinkas ĉiutage du trionoj

de la monda loĝantaro, estas la magia trinkaĵo, kiu vekas energion kaj iniciatas la vivmanieron de paco kaj amo. Tion celas ankaŭ nia lingvo Esperanto.

Do aliĝu! Rakontu pri teo kaj amo per mallongaj filmoj! Ni estas pretaj gastigi vin en Ĉinio!

Subtemo - decidata de vi!!!

La temo estas «Teo kaj Amo». «Amo» estas ne nur la profundaj rilatoj inter viro kaj virino, sed ankaŭ pli ampleksa kaj pli granda, ekzemple amo de gepatroj, amo inter gefratoj, amo inter amikoj, amo al la naturo, amo al paco, amo al legado, vojaĝo, Esperanto, literaturo, sporto...



estas bonvenaj ĉiuj subtemoj. «Teo kaj Amo» estas la ĉiama titolo de nia filmkonkurso kaj filmfestivalo, kiel Oscar-filmfestivalo kaj Cannes-filmfestivalo. Informas: Ĝoja perfectgoja@163.com Pliaj detaloj: <http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016e>

Legi en Esperanto

# Vizito al la libroservo

**E**stas bele, kiam la libroservo estas en la koro de la kongreso, tiel ke eĉ se vi ne intencas iri tien, vi trafas la lokon kaj emas eniri nur por rigardi kio novas, kaj...fine aĉetegas ! Ne estis tiel en Nitra, kie la tre fora libroservo necesigis specialan ekskurson. Ĝi estis loko rezervita al tiuj, kiuj vere, malgraŭ distanco, varmego, abundo da programeroj, insistis aĉeti librojn ! Plu ekzistas tiu rariĝanta speco de homoj, kiuj pretas multon oferi por atingi senfantazie aranĝitan kolekton da eldonaĵoj...

La tablo de novaĵoj estis mia ĉefa celo. Malgraŭ tio, ke ne longe antaŭe mi butikumis ĉe la CO, estis intertempe publikigitaj pluraj libroj nepre havindaj. Ĉi tie mencio pri nur kelkaj el ili.

- Nova eldono de **La danĝera lingvo**, plene reviziita studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto, de Ulrich Lins. Vidu en la franclingvaj aktualaĵoj.
- Post kvarjara laboro aperas la **Memorlibro** por Josef Ŝemer. Ĝi estas historia dokumento pri la israela movado, kun pli ol 50 artikoloj de Josi, publikigitaj dum kvar jardekoj. La libro ampleksas 400 paĝojn, kun pli ol 200 fotojn. Ĝuu la judajn ŝercojn !
- Nova libro de Kalle Kniivilä: Idoj de

la imperio, La rusoj en Baltio. Dum tri vojaĝoj en 2015 la aŭtoro vizitis la tri baltiajn ekssovetiajn respublikojn kaj intervjuis rusojn loĝantajn tie (inkluzive de esperantistoj, ekzemple la familio Piščikas, alivorte Asorti).

• **Kvin geamikoj** de Julia Sigmond. La aŭtorino dum multaj jaroj havis intencan korespondadon kun kvin famuloj de la movado: Ada Fighiera-Sikorska, Johannes Palu, Nikolao Danovskij, Stanislaw Janusiewicz kaj Tibor Sekelj. Fascina libro, pri kiu ni parolos en venonta numero de LME.

• **Dudek kvar horoj el la vivo de virino** de Stefan Zweig. La mirinde plej bela kaj samtempe plej terura tago en la vivo de angla vidvino. Mi jam legis la libron en franca traduko, antaŭ jaroj. Sed kun plezuro mi relegis tiun juvelon en la esperanta vesto, zorge tradukitan de Detlef Karthaus.

La rusa eldonejo Impeto, kiu eldonis la verkon, eldonis ankaŭ novajn sciencfikciajn librojn, kaj fabelojn. Imponas la ĉarmaj ilustraĵoj de Anna Striganova en **Fabeloj pri malicaj estaĵoj kaj aliaj libroj**.

• En tute alia stilo estas la kortuŝaj **rakontoj de Heidi**. Mi legis ilin kiam mi estis infano, sed estis interese relegi

tion multegajn jarojn poste.

Heidi de Johanna Spyri estas la plej konata verko el la tuta svisa literaturo, kaj la Esperanto-versio nun estas la 53-a lingvoversio de la romano. Libro cetere ne nur por infanoj, sed ankaŭ por ĉiuj plenkreskuloj, kiuj ŝatas infanojn. Aperis **La Migro- kaj lernoĵaroj de Heidi**, kaj **Heidi povas apliki, kion ŝi lernis**.

• **Home en senhomeco, Militaj impresoj** de Martin Stuppig estas memoraĵoj el la dua mondmilito, kiam la aŭtoro - fervora esperantisto - estis devigata batali por la Tria Imperio.

• Pri la kongresa lando aperis originale verkita de Ján Vajs, **Slovakaj plejoj**. Naturaj, geografiaj, biologiaj, konstruaj, verkaj, homaj plejoj. Bele ilustrita, ankaŭ kun esperantistaj plejoj en Slovakio.

• Kaj jam pri Koreio, la kongreslando, **Márkus Gábor** daŭrigas sian serion da libroj...

• **Raportoj el Japanio 19, Katastrofo de Japanio en la kvina jaro**, de HORI Jasuo

• Kaj nun fine kolora IKU-libro! **Internacia Kongresa Universitato 2016, 69-a sesio**. Prelegoj de B.-A. Wickström, A. Wandel, J. Alcade, J.A. Vergara, So Gilsu, O.E. Raola, M. Fettes, H.M. Maitzen, A. Striganova. **C.N.**

Konkurso

# Esperanto-Sumoo


**L**a 42a Esperanto-Sumoo finiĝis sukcese. 250 homoj el 26 landoj legadis librojn ekde la 11a de septembro ĝis la 25a (15 tagojn). Entute ili legis 15000 paĝojn kaj kontribuis multe al la movado kaj librovendado.

Jen estas la 5 plej grandaj sumoo-landoj :

- |               |                   |
|---------------|-------------------|
| 1. Japanio :  | 65 partoprenantoj |
| 2. Francio :  | 34                |
| 3. Koreio :   | 33                |
| 4. Brazilo :  | 15                |
| 5. Pollando : | 15                |

La novembra Esperanto-sumoo komenciĝos ekde la 13a de novembro ĝis la 27a (15 tagoj).

HORI Jasuo  
hori-zonto@water.sannet.ne.jp



## Muzike

# Kio nova ĉe VINILKOSMO ?

**J**unio 2016 estis riĉoplena en novaj Esperanto-muzik-albumoj per la apero de la fizika KD-albumo jOmO okcitanas, kaj la bitaj albumoj de Espo Despo Bosniumas kaj Kompendium de Solotronik. En julio aperis la bita albumo Sovaĝa animo kaj fizika KDo de Espo Despo. La KD albumo de BaRok-Projekto aperis en aŭgusto.



### jOmO okcitanas

Por tiu ĉi nova albumo, JoMo invitis en la studio de La Trappe la muzikistojn de la grupo Brankabodegaires (Bodegistoj), kun kiuj li ludas surstrate en la diversaj karnavalaj, patronaj festoj kaj paradmarŝoj de la regiono. Ege festuma, ĝoja, kaj danciga, ilia repertuaro prenas siajn radikojn en la tradiciaj okcitanaj kanzonoj. La ĉefa instrumento de la bando estas sendube la «bodego», sakŝalmo el haŭto de kaprino, kaj pro tio oni nomas ĝin ankaŭ per okcitana vorto «la craba» («kaprino» en la okcitana, prononcu [krabo]). Preskaŭ malaperinta post la unua mondmilito, ĝi renaskiĝis dum la 1970aj jaroj dank'al kelkaj pasiuloj. La tekstoj de la albumo prezentas diversajn aspektojn de la kulturo de

Okcitanio, de la sociaj luktoj al la pasio pri rugbeo, tra la vina aŭ karnavala tradicio, kaj la lukto de la lingvo por supervivo.

JoMo havis la eblecon prezenti ĉi tiun laboron dum la UK de Lille en julio 2015. La apero de ĉi tiu nova albumo kongruas kun la baldaŭa eldono de lernolibro de la okcitana lingvo por esperantistoj, kiun JoMo verkis. Bona duopa maniero ekkoni la okcitanan kulturon!

La fizika albumo jOmO okcitanas sur KD disponeblas en la reta diskoservo ĉe: [www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd128&lng=e](http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd128&lng=e)

### Bosniumas

La nova albumo Bosniumas de Espo Despo liveras sevdalinkojn en Esperanto (tradicia bosnia muziko), vere eksterordinara sperto, des pli surpriza ke ĝi rezultas el tute nova muzikmaniero malproksima de ilia kutimo, kune farita de aro da muzikistoj el malsamaj landoj kaj muzikhorizontoj.

Argentinano Alejandro Cossabela, Flávio Fonseca el Brazilo, parizano Gijom Armide, Patrik Austin el Finnlando kaj ankoraŭ aliaj gastoj kundivididas ĉefe la regon de kantado en Esperanto, kaj kapablas kontribui sian apartan fakecon kaj elkovi la entuziasmon necesan por realigi ĉi tiun projekton, malgraŭ siaj ofte tre malproksimaj muzikistiloj.

La KD mendeblas ĉe: [www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd129&lng=e](http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkdd129&lng=e)

### Sovaĝa animo

La 13a de julio estas la Tutmonda Tago de Rokmuziko kaj la brazila bando BaRok-Projekto el Catalão (Goias) kune kun Vinilkosmo elektis tiun memorindan tagon kiel oficialan aperdaton de la bita albumo Sovaĝa animo por antaŭanonci la preparon de la fizika



versio sur KD, kiu aperis dum aŭgusto en Brazilo kaj ĉe [vinilkosmo.com](http://vinilkosmo.com).

### BaRok-Projekto

La brazila bando BaRok-Projekto estis fondita de la gitaristoj Rafael Milhomem kaj Muniz en 2007. Ĝi estas la unua bando de potenca metalo (Power Metal) kiu lanĉis oficialan albumon en la lingvo Esperanto.

Ĝia muziko estas potenca metalroko kun karakterizaĵoj de la baroka, klasika, kaj folkloro muzikoj, kun tekstoj pri la brazila tupia mitologio.

En la komenco, la bando estis nur virtuala, kun unu aŭ du muzikistoj ludantaj diversajn muzikilojn en sia hejmstudio.



La ĉefa celo estis krei muzikaĵojn kaj inviti kantistojn por registri, kaj tiel lanĉi la kantojn libere en interreto.

En 2007 la grupo memeldonis 4-titolan virtualan konceptan albumeton Batal-temp'. Partoprenis en la projekto la kantistoj Geovani Maia (Bataltemp'), Paulo Melo (Nobla Dezir'), kaj Leo Yanes (Heredo de la Post-Milit').

Post longa paŭzo, komence de la jaro 2013 la grupo anoncis rekomendon de sia agado, kaj ŝanĝis sian celon. Estis starigita kompleta bando celanta koncertojn kaj novan albumon. Tiel naskiĝis en 2013 la unuopaĵo La plej bona ĉasisto. Por tiu ĉi titolo la bando konsistis el Leo Yanes (kantisto), Junior Nieri (drumo), Murilo Ramos (basgitaristo de la bando Heaven's Guardian), Muniz (gitaro), kaj Rafael Milhomem (gitaro).

Dank' al La plej bona ĉasisto la bando iĝis finalisto de la muzika konkurso «Kanto de la Jaro» (2013) de la revuo Kontakto.

En 2015 la grupo subskribis kontrakton kun la muzikeldonejo Vinilkosmo, kaj lanĉis en la fino de la sama jaro la unuan oficialan EP Jen nia Viv-river', taksita kiel la unua oficiala albumo de peza metalo en Esperantujo.

Ĝi enhavas la malnovajn muzikaĵojn, kaj ankaŭ la novan, kiu titoligas la albumeton, kun voĉo de la invitita kantistino Karliene Araújo. Jen nia Viv-river' estas ario eltirita el la metal-opero kiun BaRok' verkas.

En 2016 BaRok-Projekto prezentas sian unuan plenan albumon titolitan Sovaĝa Animo, aperinta la 13-an de julio 2016 en bita formo kaj dum aŭgusto sur KD.

La bando nuntempe konsistas el Karliene Araújo (voĉo); Junior Nieri (drumo); Thiago Alberto (basgitaro); Muniz (gitaro) kaj Rafael Milhomem (gitaro). Por tiu nova albumo partoprenis

ankaŭ pluraj gravaj gastoj.

Laŭ [www.vinilkosmo-mp3.com/eo/hardkoro-punko-alternativa-metallo-barok-projekto.html](http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/hardkoro-punko-alternativa-metallo-barok-projekto.html)

## Planedo nia

Planita por septembro 2016, Planedo nia estas la unua albumo de la bando Vojaĝo. La bando venas el Tuluzo kaj ĝi portas en siaj bagaĝoj muzikon kun sudamerikaj akĉentoj kaj komunikema verovo. Ses muzikistoj: Ĝuzepe (Jean-Claude Patalano) - saksofonoj/klarneto/fluto, kanto; Audrey Rey - voĉaj korusoj; Gilles Benard - klavaroj; Didier Kerboull - basgitaro; Pascal Marceillac - drumo; Julien Fisher - perkutiloj.

Ili ĉiuj decidis dediĉi sian arton al la kundivido de la ideoj pri protektado de la naturo kaj de nia kara planedo "Tero" pere de la internacia Lingvo.

Vojaĝo preparas sian unuan albumon



kiu estos vere riĉa miksaĵo kun subtilaj kaj varmaj komponaĵoj invitantaj vin al feliĉa kaj trankvila promenado en la kerno de Amazonio ĝis la Mediteranea marbordo, per sinkopaj ritmoj el bosonovo, sambo, salso, ĝis svingaj influoj de novorleana ĵazo aŭ virtuozo de ĉoro. Albumo por vere longa vojaĝo... por ĉirkaŭi kaj ŝirmi nian amatan planedon Tero.

(C.N laŭ la blogo de Vinilkosmo [www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo.html](http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo.html))

## La 3<sup>a</sup> versio de Vinilkosmo-mp3.com lanĉita

**P**or legi la kompletan informleteron alklaku la ligan: <http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/newsletter-eo/listid-6/mailid-17-informletoro-de-vinilkosmo-n-r-41-oktobro-2016.html?tmpl=component>

## Novaĵoj pri la ABONKLUBO de Vinilkosmo kaj TD tuŝ

Por la jaro 2016 la VK- ABONKLUBO atingis 104 abonantojn, kaj ni sukcesis plenumi ĉiujn promesojn kaj sendis al ĉiuj kiuj respondis siajn albumojn kaj T-ĉemizojn.

La pozitivaj rezultoj de la ABONKLUBO havis gravan efekton ĉar la abonsubtenoj tre efikis por aperigi la eldonojn dum la jaro.

En decembro 2016 la aktualaj abonantoj devos reaboni por la jaro 2017, sed necesus multe pli da abonantoj por plu daŭrigi la estontan produktadon kaj eldonadon de novaj muzikalbumoj.

Subtena helpo pere de abonado al nia muzika katalogo estas ĝis nun la plej bona alternativo kiu garantias pluvivadon de la muzika agado de Vinilkosmo.

Por la jaro 2017 necesus atingi 200 abonantojn por antaŭvidi bonan progreson de la eldona laboro por 2017 kaj konservi la retejojn en bona funkciado.

Do prepariĝu por aliĝi al la abonklubo por la jaro 2017 ekde novembro kaj decembro...abonante ĉi tie :

[www.vinilkosmo-mp3.com/eo/com-virtuemart-menu-mediafiles/vinilkosmo-abonklubo.html](http://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/com-virtuemart-menu-mediafiles/vinilkosmo-abonklubo.html)



## Virtuala vojaĝo al la ĝemelurboj de Nitra

**E**stis iom ŝoke, kiam mi eksciis fine de majo, ke ne estos ekspozicio pri la ĝemelurboj de Nitra. Estis programita grandioza akcepto, kun subvencioj de EU, sed ĉar la subvencioj ne venis, tio forfalas. En Lille Raymonde Coquisart organizis



Pri Naperville (Foto Leszek Kordylewski)

ekspozicion pri la ĝemelaj urboj. Ĝi estis ŝatata. En Bonaero, kie LKK havis malmultajn rimedojn, estis ekspozicio pri la ĝemelaj urboj (danke al sendo de poŝtkartoj fare de HORI Jasuo). Se oni sukcesis okazigi en Bonaero ne devus esti problemo okazigi ĝin en Nitra, kiu havis multe pli da organizaj fortoj. Malfrue ni eksciis, ke nenio okazos, kaj

ni prenis la defion okazigi tiun ekspozicion, kvankam neniu franca urbo estas ligita al Nitra.

Kompreneble estus pli bone, se loĝanto de Nitra tion farus, ĉar li pli bone konas la urbon Nitra, kaj eble la cirkonstancojn laŭ kiuj la urboj ĝemeliĝis. En ĉiu

urbo ni klopodis kontakti esperantistojn, ĉu delegiton, ĉu konatulon loĝantan proksime de la koncerna loko. Ni estis bonŝancaj ricevi multe da respondoj. Tamen mankis la tempo por pli scii pri la ĝemeliĝo, entute kial la urbo estas partnero kun Nitra. Sed mi iom scivoleme esploris, kaj vikipedie lernis pri amaso da aferoj.

Nitra estas la plej malnova urbo de Slovakio. Kaj havas kompleksan historion, sub hungaroj, tataroj, husanoj, turkoj... En 1910 loĝis en la urbo 16 418 homoj (9 754 hungaroj, 4 929 slovakoj, 1 636 germanoj). La urbo estis longe ĉefurbo de la historia hungaria departemento Nyitra. En 1920 la regiono iĝis parto de Ĉeĥoslovakio. En 2011 loĝis en la

urbo 78 351 homoj (70 447 slovakoj, 1 443 hungaroj, 521 ciganoj, 520 ĉeĥoj, kaj aliaj).

La ekonomia disvolvigo ekis en la 19a jarcento danke al la agrikulturaj aktivaĵoj.

Laŭdifine ĝemelaj urboj estas urboj, kiuj interkonsentis pri speciala partnereco por kultura kaj eble ankaŭ ekonomia interŝanĝo. Kutime ĝemelaj urboj estas en diversaj

landoj. Kutime ili estas pli-malpli samgrandaj, aŭ/kaj kun simila kultura fono, aŭ/kaj kun partnerigeblaj ekonomiaj intereso.

Kutime... sed la partneroj de Nitra ofte ne enkadriĝas en tiuj kutimaj trajtoj. Mi havis multajn surprizojn !

Unua surprizo : **Kiom da ĝemelurboj estas ?** Kiuj ili estas? La demando estas facila, la respondo ne. Laŭ la diversaj retejoj (esperanta, franca, slovaka, alilingvaj) la respondoj malsamis. Ŝajnas, ke la diversaj servoj ne bone komunikas inter si. Kaj ke la informoj ne estas ĝisdatigitaj. Estis grandaj diferencoj.

La ĝemeliĝoj komenciĝis relative malfrue. Unuan ĝemeliĝon ni trovas en 1972, kaj temas pri **Kroměříž**, urbo kiu nun estas en **Ĉeĥio**, sed kiu tiam estis en Ĉeĥoslovakio, same kiel Nitra. Temas pri urbo de ĉ. 30.000 enloĝantoj, do nete pli malgranda ol Nitra. Eble pro simila kultura fono. En Kroměříž estas ĉefepiskopa kastelo, en Nitra estas episkopa palaco.

Cetere Nitra havas aliajn geografie proksimajn partnerajn urbojn. **Spišská Nová Ves (Slovakio)** partneriĝis en 1999. Nu, nenio malhelpas, ke

Pri Bački Petrovac (Serbio)  
Foto de Sors bona.



Koreaj esperantistoj memorfotos en tutlanda studkunveno en Cheongdo apud Gyeongju



samlandaj urboj de malsama regiono ĝemeliĝas. Ne estas lingva problemo, kaj certe estas interesaj interŝanĝoj. Kaj en Ĉeĥio (sed jam post la disiĝo de la landoj) kun **České Budějovice** en 1994.

Tie estas bela kvadrata placo, en la tradicia stilo, kun belaj galerioj ĉirkaŭ la placo.

En Eŭropo, Nitra partneras krome kun **Osijek (Kroatio, 1997)**. Interese estis, ke ĵus antaŭ UK en Osijek okazis la kunveno de OSIEK. Alvenis el ĝi rekte al la kongreso pluraj homoj, i.a. Anne kaj Claude Jausions, kaj Višnja Branković, kiu raportis pri la aranĝo.

Nitra ekpartneris kun la bela historia loko **Veszprém (Hungario)** nur tre lastatempe (2012). Eva Golden, de la esperanta grupo de Veszprém ankaŭ partoprenis la kunvenon pri ĝemelaj urboj.

**Pollando.** Strange, ŝajnas ke du aŭ tri urboj de Pollando partneras kun Nitra. Plej certa estas **Zielona Góra**, ekde 1992 kaj **Kielce**. Pri Suwałki, proksima al nia « sankta » urbo Bjalistoko estas mencio nur en la franca vikipedia retejo. Mi ne povis ricevi konfirmon pri la partnereco.

Mi devis zorge atenti, ne miksi la urbojn, kiam mi kunmetis la fotojn: iuj el la polaj kaj la mezeŭropaj urboj havas iom similstilajn ĉefplacojn, aŭ kirkojn, aŭ historiajn stratojn...

Pri **Zoetermeer (Nederlando)** urbo tuj ĉe Hago la stilo estas tamen alia. Kaj certe nekonfuzebla en malsama parto de Eŭropo, estas **Guadalajara en Hispanio**, kun sia impona palaco.

La virtuala vojaĝo trairas la mondon. La urbo Nitra serĉis kontaktojn tra la tuta mondo, kaj de jaro al jaro ampleksigas la kontaktojn.

Kaj jen ekstereŭrope, el pluraj kontinentoj:

Interese, ke jam en 1988 Nitra stariĝis partnerecon kun **aŭstralia** urbo **Gosford**. El Gosford (Aŭstralio) ne estis problemo trovi fotojn ĉar tie estas delegito de UEA Jonathan Cooper. La belaj strandoj, la haveno revigas nin...

Nur kelkajn jarojn poste en 1993 estis ligo al **usona** urbo **Naperville**. Ĝi



Pejzaĝo kun la mondfama templo Bulguk-sa en la urbo Gyeongju

estas antaŭ-urbo de Chicago, kie estas Esperanto-grupo. Malfacile havi karakterizan foton, povus esti en alia urbo de Usono, aŭ de eĉ alia lando.

Nitra estas ĝemeligita ankaŭ kun urbo de la venontjara kongreslando **Korea Respubliko**. **Gyeongju** estas urbo kun 264 000 enloĝantoj, do multe pli granda ol Nitra. Estas en la urbo multaj arkeologiaj riĉaĵoj, i.a. la templo Bulguksa.

Sed mia plej granda surprizo estis la ĝemeliĝo de Nitra kun **Bački Petrovac (Serbio)**.

Urboj proksimaj, eĉ samlandaj, urboj

foraj, urboj similecaj, kaj jen urbeto kun malpli ol 7000 loĝantoj, pri kiu stariĝas la demando: kial Nitra ĝemeliĝis kun tiu malgranda loko ?

Kiam mi skribis al delegito de UEA en proksima urbo (je 25 km) por peti eventuale foton, mi ricevis la jenan nekuraĝigan respondon: « Ne, mi ne estas de Bačsky Petrovac, kaj neniam mi estis tie ».

La solvon mi trovis en artikoloj de Vikipedio. Tiu urbeto estas nun en Serbio. Kiel Nitra, ĝi havis iom kompleksan historion. En 1745 slovakoj alvenis. Ĝis



Gosford haveno  
(Fotisto :  
Jonathan  
Cooper)



Veszprém

fine de la 1-a mondmilito la loko apartenis al Hungario, poste al la Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj, ekde 1928 al Jugoslavio, ekde 2006 kiel Serbio. En 2002 loĝis en la urbo 6727 homoj, (interalie slovakoj 5549 (83 %), serboj 573 (9 %), aliaj eksjugoslavianoj 169). Kaj jen urbeto en Serbio kun majoritato de Slovakoj! Bački Petrovac estas aldone ĝemeligita kun tri aliaj slovakaj urboj: Martin, Ružomberok kaj Stará Ľubovňa. Ĝi delonge strebas viviĝi la slovakan kulturon, kaj kreis plurajn kulturajn instituciojn, kiuj rilatas al la slovak kulturo: kultura instituto, kiu organizas ĉiu-jare folkloran festivalon

kaj gastigas nacian muzeon de Bački Petrovac, impona slovak biblioteko, slovak teatro de Vojvodino. Loka galerio organizas ekspoziciojn, i.a. la bienalon de slovakaj artistoj en Serbio. Jen kiel oni malkovras fascinan parton de la etna kaj kultura mozaiko de Mezeŭropo.

**Claude Nourmont**

Zoetermer (Fotisto : Rob Groeneveld)



Sendita de la Eo-grupo de Osijek



Zielona Góra,  
(Fotisto : Marek Lalko)



esperanto  
France

&

esperanto  
Ile-de-France

**atendos vin en Francilio!**



ESPERANTO-KONGRESO

25-28 majo 2017

Mandres-les-Roses (94)



Asocia domo

Dormo-ĉambroj

Kongres-salonoj

Parkego (6ha)

Restoracio

Sportejoj

Turismo

Kokinoj!



Site officiel : [kongreso2017.esperanto-france.org](http://kongreso2017.esperanto-france.org)

# OFFRE SPÉCIALE DESTOCKAGE !



Grand dictionnaire français/espéranto  
avec son supplément

à **10 € au lieu de 29€**  
(hors frais d'envoi)

Le plus complet des dictionnaires  
français/espéranto avec **32 000 entrées**  
et 944 pages



Date limite pour bénéficier de ce  
tarif exceptionnel :  
**15 décembre 2016**

## Pour commander :

- directement **en ligne**, après connexion ou création de votre compte : cela se passe dans votre espace perso accessible sur la page d'accueil du site [www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org)
- ou **écrire** à [butiko@esperanto-france.org](mailto:butiko@esperanto-france.org) en indiquant les articles que vous désirez commander ; on vous précisera le montant détaillé de votre commande avec les frais d'envoi et les modalités de paiement
- ou venir **retirer vos achats** directement à notre boutique et ainsi économiser les frais d'envoi.

Açetebła ĉe



4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS • à 50 m du Métro Bastille  
Tél. 01 42 786 886 • [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org)

